## *Enkonduko*

Verkoro (Vercors [Verkor]) estas la kaŝnomo kiun la ilustristo kaj verkisto Johano Brulero (Jean Bruller [Ĵan Bruler]) adoptis en 1941 kiel beletra plumnomo en la Rezistado dum la dua mondmilito[1].

Johano Brulero naskiĝis la 26-an de februaro 1902 en Parizo kaj mortis la 10-an de junio 1991 ankaŭ en Parizo.

Lia plej fama verko estas "La Silento De La Maro" kaŝe eldonita en 1942.

## *Biografio*

Lia patrino, Ernestino Burbono (Ernestine Bourbon [Ernestin Burbon]), estis franca intruistino kaj lia patro, Ludoviko Brulero (Louis Bruller [Lui Bruler]), unue eldonisto, poste bienproprietulo kaj luigisto, venis el Hungario[2].

La historio de lia patro, alveninta Parizon en 1880, fervora admiranto de Francio, "Patrino de la artoj kaj ideala enkarniĝo de la justeco, de la libereco", inspiris al li la novelon "La Marŝo Al La Stelo", kaŝe eldonita dum la nazia okupacio de Francio.

Li ricevis sian bazan kaj mezgradan edukadon en la pariza privata laika lernejo La Alzaca Lernejo ("École Alsacienne"), konata pro ĝia humana pedagogio. Teodoro Monodo (Théodore Monod [Teodor Mono]), venonta fama natursciencisto, estis lia kunlernanto kaj restis lia ĉiama amiko.

Post sia abiturienta diplomo, li deziris iĝi sciencisto sed misorientita, li studis por iĝi elektroinĝeniero. Kvankam, li ricevis sian inĝenierdiplomon kun bronzmedalo en 1923, li ne deziris aniĝi al la industria medio.

Ekde 1921, li iĝis humurista desegnisto kaj ilustristo. Li eldonis siajn unuajn desegnojn en la revuo "Sans-Gêne" (Senĝenulo). Li skribis siajn unuajn kronikojn "Les propos de Sam Howard" (La diroj de Sam' Hoŭard'), influita de rakontoj de Anatolo Franso (Anatole France [Anatol Frans]). En junio de 1923, li kreis sian propran humurrevuon nomita "L'Ingénu" (La Naivulo) omaĝe al Voltero. Li skribis kaj

1 Tiu kaŝnomo devenas de la samnoma montomasivo en la francaj Alpoj. Multaj rezistantoj kaŝnome adoptis francajn loknomojn (ekz. Raymond Samuel kiel Aubrac, François Mauriac kiel Forez...). Notinde estas, ke pliposte (en 1944) tiu montomasivo iĝis fama loko de rezistbatalo.

2 Li donis sian nomon al pariza strato en la 14-a kvartalo.

desegnis kronikon nomatan "Les propos d'un huron" (La diroj de hurono). En 1924, li interrompis tiun laboron por partopreni al oficira trejnado en militlernejo. Poste li plenumis dum ses monatoj sian militservon en Tunizio. En 1925, post reveno en Parizo, li laboris kiel reklamdesegnisto, aparte por *Sitroen*' (Citroën[3]).

Li eldonis sian unuan nigrhumuran albumon (tekstoj kaj desegnoj) en 1926 : "21 recettes pratiques de mort violente" (21 pratikaj receptoj por perforta morto). En 1930, li ilustris infanalbumon "Patapoufs et Filifers" (Bareluloj kaj fadenuloj) verkita de Andreo Morŭa' (André Maurois) pri la malbonaj efektoj de segragacio.

Pacisto ĝis 1938, li mobiliziĝis dum la dua mondmilito en urbeto piede de la montomasivo Verkoro. Poste li aniĝis al la Rezistado kuraĝigita de sia amiko Petro de Leskuro (Pierre de Lescure).
Aŭtune 1941, kiam preskaŭ ĉiuj eldonistoj akceptis la germanan cenzuron, Petro de Leskuro kaj li fondis la eldonejon "Les Éditions De Minuit" (La Noktomezaj Eldonoj). Danke al tiu kaŝeldonejo li eldonis sian novelon "La Silento De La Maro", la 20-an de februaro 1942.
Kvankam la originala eldono estis tre limigita, la libro iĝis tre fama kaj estis larĝe disvastigita, aparte ĉar diversaj grupoj en pluraj landoj aperigis multajn flankajn re-eldonojn. Ekzemplerojn eĉ estis paraŝutitaj sur Francio. La novelo ankaŭ aperis felietone en la usona magazino « Life » (Vivo). Inter 1942 kaj 1944, la eldonejo liveris 25 titolojn.

Li ankaŭ desegnis la logotipon de La Noktomezaj Eldonoj kun la stelo kiu estas uzata ekde 1945.

Fine de la milito, li partoprenis la Nacian Komitaton De La Beletristoj (CNE, Comité National des Écrivains). Li rakontis siajn memoraĵojn en "La Batalo De La Silento". Li ankaŭ partoprenis la Komitaton De Purigado (Comité D'Épuration) sed rezignis pro la malegaleco de punoj kontraŭ la kunlaborintoj de la nazioj, unuflanke la aŭtoroj, severe punitaj, kaj aliflanke la eldonistoj kiuj preskaŭ neniam estis punitaj. Samtempe li rifuzis partopreni al la farado de "nigra listo" kaj lasis la aŭtorojn al la juĝo de iliaj konscioj.

Pro familia heredaĵo kaj edukado, li frue elmontris maldekstrajn reformistajn ideojn. Li firme subtenis la Popolan Fronton en Francio (1936), kaj ekde la mezo de la 30-aj jaroj, li pli kaj pli simpatiis al la komunistaj ideoj sed neniam aniĝis

3 Fama franca aŭtomobilkompanio.

al la Partio. Dum la dua-mondmilita lukto, li ankoraŭ plu alproksimiĝis al la komunistoj kaj poste, ofte kunlaboris kun ili en pluraj luktoj. Li tamen ne hezitis konigi siajn dubojn pri la politiko de la Partio. Li komencis malproksimiĝi dum la proceso de Rajk kaj aliaj hungaraj estroj en 1949 kaj ĉefe post la Sovetia represio en Budapeŝto en 1956. Li definitive rompis kun ĝi kaj publikigis "Por Adiaŭi" (Pour Prendre Congé (PPC)) en kiu li rakontis siajn konfliktajn rilatojn kun la komunistoj.
En 1960, kun Sartro[4] (Sartre), li estis unu el la subskribintoj de la Manifesto de la 121 verkistoj kiuj deklaris "Rajto Malsubmetiĝi en la prialĝeria milito". Por protesti kontraŭ uzo de la torturo en Alĝerio, Vercors resendis sian dekoracion de la Honora Legio.

Lia unua novelo, "La Silento De La Maro" rakontas la obstinan mutecon de onklo kaj lia nevino fronte al germana oficiro, talenta muzikisto kaj amanta la francan beletron, kiu loĝas en ilia rekviziciita domo, kaj senĉese provas estigi dialogon kun ili.

La celo de la verko estis instigi la francojn al rezisto kontraŭ la provoj de la nazioj por logi ilin : ĝis 1941, la germanaj soldatoj ricevis ordonojn por, tiom kiom eblis, konduti sin "afable" al la francoj.

Verkoro estas ankaŭ fama por sia filozofia romano "La Eksternaturaj Bestoj" (Les Animaux Dénaturés) de kiu li eltiris la teatraĵon "Zoo aŭ la filantropa Murdinto" (Zoo ou l'Assassin philanthrope). En tiuj tekstoj, li provis respondi al la demando : "Kio estas homo ?". Li denove prilaboris tiun problemon en sia romano "Silva" (Sylva), publikigita en 1961.

La verkaro de Verkoro estas tre ampleksa kaj diversa: krom liaj albumoj, ilustraĵoj, teatraĵoj, noveloj kaj romanoj, li ankaŭ aŭtoras poemojn, eseojn, historiajn biografiojn (pri "Aristido Briando" - Aristide Briand, "Ana Boleno" - Anne Boleyn), tradukojn ("Kial mi manĝis mian patron", - Pourquoi j'ai mangé mon père), vojaĝlibrojn, multajn artikolojn kaj antaŭparolojn kaj eĉ unu kuirlibron.

Li mortis en Parizo dum la nokto de la 9-a ĝis la 10-a de junio 1991. Lia dua edzino, *Rita Baris* (Rita Barisse), brita ĵurnalisto kiu naskiĝis en Berlino, tradukis plurajn el liaj verkoj.

La beletra arkivejo *Ĵak Duse* (Jacques-Doucet) en Parizo konservas la arkivojn de la aŭtoro.

4 Sartro : fama franca filozofo.

En 1992, la franca Ŝtatsekretario por la Batalintoj (Secrétaire d'État Aux Anciens Combattants) honoris la memoron de Verkoro kaj de La Noktomezaj Eldonoj per ŝildo sur la sejna Ponto de la Artoj (Pont des Arts) en Parizo. Tiele ĝi intencis memorigi la lokon kie dum la okupacio oni interŝanĝis ekzemplerojn de kaŝeldonaĵoj sed ankaŭ la lokon, simbolo laŭ Verkoro, de la spirita radiado de Francio.

### Referenco

Vidu https://fr.wikipedia.org/wiki/Vercors_%28%C3%A9crivain%29 (france)